Kairuko

Kairuko (science ***Kairuku*** de la maoria vorto kiu signifas plonĝisto kiu revenas kun nutraĵo) estas formortinta genro de pingvenoj. La genro estas priskribita en scienca ĵurnalo Journal of Vertebrate Paleontology frue en 2012 laŭ ostoj, trovitaj en geologia formacio *Kokoamu Greensand* en Suda Insulo de Novzelando. La formacio aĝas ĉ. 27 jarmilionojn, kio sugestas ke la genro ekzistis en malfrua oligoceno[1]. Paleontologiistoj distingas du speciojn en la genro: *K. grebneffi* kaj *K. waitaki*. Ambaŭ specioj estis gigantaj, supozeble ĉ. 1.5 metrojn altaj starante. Do ili estis pli grandaj ol la imperiestra pingveno, la plej granda nun travivanta specio de pingveno[2].

Kairuko
Troveblo de fosilioj: Oligoceno
Kairuku grebneffi
Biologia klasado
Regno: Animaloj Filumo: Ĥorduloj Klaso: Birdoj Ordo: Pingvenoj
Genro
Kairuku Ksepka, Fordyce, Ando & Jones, 2012
Specioj
▪ *Kairuku waitaki* Ksepka, Fordyce, Ando & Jones, 2012 (tipo) ▪ *Kairuku grebneffi* Ksepka, Fordyce, Ando & Jones, 2012
Aliaj Vikimediaj projektoj

Referencoj

1. ↑ Ksepka, D.T., Fordyce, R.E., Ando, T. and Jones, C.M. (2012). "New fossil penguins (Aves, Sphenisciformes) from the Oligocene of New Zealand reveal the skeletal plan of stem penguins (http://www.tandfonline.com/doi/abs/10.1080/02724634.2012.652051)", *Journal of Vertebrate Paleontology* **32** (2), p. 235–254. doi:10.1080/02724634.2012.652051.
2. ↑ Giant Prehistoric Penguin was Bigger Than an Emperor | Observations, Scientific American Blog Network (http://blogs.scientificamerican.com/observations/2012/02/27/giant-prehistoric-penguin-was-bigger-than-an-emperor/)

Eksteraj ligiloj

- Giganta pingveno reaperas fosilie en Novzelando (http://nunonia.com/notico/28/02/2012/giganta-pingveno-reaperas-fosilie-en-novzelando/) ĉe Nunonia
- First Full Look at Prehistoric New Zealand Penguin (http://news.ncsu.edu/releases/tpkairuku/) angle ĉe paĝaro de Ŝtata Universitato de Norda Karolino.
- Kairuku (http://www.otago.ac.nz/geology/research/paleontology/kairuku.html) angle — speciala paĝo ĉe paĝaro de Universitato de Otago

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Kairuko&oldid=6465942"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 20:49, 24 nov. 2018.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.